

# J E N I

Aŭgusto-Oktobro 1985

Informo por kaj pri la Junularo Esperantista en Usono

Volumo 1, Numero 1



Proksimiĝas la Antaŭvespero de Ĉiuj Sanktuloj, kiam usonaj infanoj, portante trompajn maskojn de tiel "sovaĝaj" estaĵoj kiel E.T. kaj Neĝulino, ĉantaĝas plenkreskulojn kaj petas de ili frandaĵojn kariigajn. Ĉi-numero, krom la kurantaj aferoj, ni iom esploros ankaŭ alian tipon de maskoj — la metaforan. Sed hu! Ni timigos eĉ nin mem, se ni daŭros paroli tiel serioze! Do, ba al ĉiuj spiritoj senhumuraj kaj gravmienaj, kaj ek al ĉi tiu numero — Se vi aŭdacas . . . .



## Ni Pardonpetas . . .

En la lasta numero ni fripone ellasis en la artikolo pri la *Koresponda Servo Mondskala* la adreson de tiu instanco. Jen ĝi:

KSM, S-ro Llorens  
"Les Hortensias 2"  
121bis Boulevard Napoléon III  
F-06200 Nice, FRANCE

Ni esperas, ke vi pardonos nin pro tiu malĝentilaĵo. Koboldoj ĉiam okazos en presaĵoj kaj taŭgas ke ni anoncas ilin en ĉi tiu numero!

## El *Nia* Poezio?

### Difino

La formo de limeriko  
piedu laŭ ĵena metriko.  
Unua linio  
pri geografio  
kaj vosto kun verb-erotiko.

### Sudismo

Plej sude en Sud-Virginio  
knabino famiĝis pri "io".  
Teknike virgina,  
diable rafina,  
ŝi fremdas al nepre nenio.

El: *Du el* (1985) far Marjorie Boulton  
kaj Poul Thorsen

## Maske

"Oni diras, ke la vivo estas scenejo. Sed plejparte homoj ne obsediĝas pri tiu ideo, almenaŭ ne tiel fruaĝe kiel mi. Ĝis la fino de infaneco mi jam firme konvinkiĝis ke tiel statas, ke mi ludu mian rolon sur la scenejo sen eĉ unu fojon riveli la veran propran memon . . . Mi optimisme kredis ke, tuj kiam la prezentado finiĝos, la kurteno descendos kaj la spektantaro neniam vidos la aktoron ne-ŝminkitan."

El: *Konfesoĵ de Maske* far Yukio Mishima

## Senmaske

"Mi neniam kaŝas mian hebreecon kaj ĉiuj esperantistoj tion ĉi scias . . . Se mi ne estus hebreo el la ghetto, la ideo pri la unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo."

L. L. Zamenhof en letero (1985) al A. Michaux

42-a Internacia  
Junulara Kongreso  
de Esperanto



La venonta IJK okazos en Israelo. Por pli da informo bv. skribi al:

42-a IJK  
P.O.K. 22041  
IL-61220 Tel-Aviv  
Israel

## Historio de TEJO: Parto II

### Norberto Saletti

La agadon de la novnaskita TJO bremsis, post la dua Internacia Junulara Kunveno (LJK) en Tervuren, Belgujo, la dua mondmilito, kaj la konfisko de la havaĵoj de la organizo, en Nederlando, far la naziaj okupaciintoj, en 1941. Tamen, tuj post la milito, jam en aŭtuno 1945, reaperis la porlernanta revuo *La Juna Amiko*, iniciatita de gesinjoroj van Veenendaal en 1934, kaj la agado refloris. En 1947 TJO fariĝis faka asocio de Universala Esperanto-Asocio (UEA), sed la rilatoj inter la du organizoj ne tiom glate marŝis. En 1948 TJO kunfandiĝis kun la asocio "Denaska Esperantistaro". La LJK-serio rekomenciĝis en 1948 per la tria LJK en Ipswich, Britujo.

Post la 5-a LJK, en Versailles, Francujo, la junulara membraro de UEA/TJO ekvigle laboris, anstataŭigante la ĝistiamajn gvidantojn, kiuj grandparte estis plenaĝuloj, per novaj fortoj; tamen, plurestis problemoj en la junulara afero, kaj la tiutempajn agadojn oni povas resumi en la aperigo de *La Juna Piro* kaj en la okazigo de la LJK.

En la 8-a LJK en Ry, Danlando, en 1952, la organizo ŝanĝis sian nomon al Tutmonda Esperantista Junular-Organizo (TEJO). Tiu periodo estis kriza epoko por TEJO: financaj problemoj, internaj kvereloj, nekomprene far la pli aĝa movado, kaj aliaj problemoj bremsis la agadon de la organizo, kiu sukcesis revigliĝi nur en 1956, kiam, kadre de la 12-a LJK en Büsum, Federacia Respubliko Germanio, oni decidis proponi al UEA, ke TEJO estu la Junulara Sekcio de UEA mem.

Tion la Komitato de UEA akceptis, dum la samjara 41-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, Danlando, fiksante apartajn kaj favorajn kotizojn por la junaj membroj, kaj farante tiel, ke aŭtomate UEA-membro malpli ol 26-jara estu membro de TEJO. En tiu tempo komenciĝis la kunlaboro inter UEA kaj TEJO, forigante izolitecon kaj duobligon de la laboroj. Malgraŭ tio, ke kelkaj Landaj Asocioj de UEA ne tuj akceptis la novan statuson de TEJO, starigante kaj helpante junularajn sekciojn en sia lando, la junulara movado kreskis relative rapide.

La epoko de interna reorganiziĝo ĉesis en 1960, kiam, kadre de la 16-a Internacia Junulara Kongreso en Rotterdam, Nederlando, oni malfermis sin al la ekstera mondo, ekrilatante kun pluraj ne-esperantistaj junularaj organizoj (NEJoj). La sekvan jaron, kadre de la 17-a LJK en Wokingham, Britujo, kelkaj Landaj Sekcioj (la junulara ekvivalento de Landaj Asocioj) de TEJO subskribis la deklaron de Wokingham, kiu celis plifirmigi la kunlaboradon inter la Landaj Sekcioj, kiuj tiam ekzistis, kaj instigi aliajn grupojn fondi novajn Sekciojn.

En 1963, kiu estis la "Jaro de la Junularo en la Esperanto-Movado", kune proklamita de TEJO kaj UEA, la junulara movado faris gravajn paŝojn antaŭen: pli granda interesiĝo far la pli aĝa membraro, eniro de pliaj Landaj Sekcioj, kaj, ĉefe, la ekapero de *Kontakto*, la kultura revuo de TEJO, kiu, malgraŭ iom da teknikaj problemoj en sia historio, pludaŭras en sia apero. *Kontakto* estis, kaj restas, aparte grava, ĉar ĝi estis unu el la plej sukcesaj klopodoj aperigi revuon en Esperanto, ne nepre *pro* Esperanto.

**\*\*Daŭrigota en venonta numero\*\***



### Anoncoj

Jen-ano, Curt Ford, Jr. (CA), lastatempe elektiĝis Prezidanto de S.F.E.R.O. (t.e., San-Franciska Esperanta Regiona Organizo). Curt ankaŭ partoprenis la GEJ-ELNA Interŝanĝon ĉi-jare.

Derek Roff (NM & Nederlando) ĵus demisiis de sia posteno ĉe UEA en Roterdamo. Ĉiuj korespondaĵoj nun direktiĝu al lia adreso en Nov-Meksikio, kiu troviĝas en la ELNA-Membrolisto 1985.

## Vortoj Kiuj Vin Hantos en la Numero

**Antaŭvespero de Ĉiuj Sanktuloj:** "Halloween." La tago post "Halloween" laŭ la katolikoj estas "All Saints Day," tago dediĉita al ĉiuj sanktuloj.

**Neĝulino:** Angle: "Snow White."

**Ĉantaĝi:** Angle: "to blackmail."

**Kariiga:** Kaŭzanta karion. "Cavity-causing."

**Konstitucio:** "Falsa amiko." Ne estas angle "constitution," sed "state of health." Kp. "to take one's constitutional" kaj la esperantan "statuto." Ne havas la politikan signifon de la angla.

**Kuranta:** "Current." Pli malpli = nuna.

**Mikronoveloj:** "Short-shorts." Mallongaj, ofte unupaĝaj rakontoj.

**Falsita:** La radiko estas "falsi," do verba, kaj ne "falsa" (adjektiva). La pasiva formo estas do falsita kaj ne falsigita.

**Mistifiko:** "Hoax." Ne "mystification." Alia falsa amiko.


**Simpatii:** Ne havas tute la saman senco de la angla "to sympathize." Signifas "senti sin komforta kun, amika al iu aŭ io." La anglan vorton "to sympathize" pli bone respegulas la vorto "kompati."

**Rava:** "Delightful," "wonderful," "super," ne "raving (mad)."

**Ŝablono:** Angle: "trite saying, belief." Egalas al modelo, banalaĵo, senoriginalaĵo. Ŝablona = "hackneyed." Kp. "gurdita."

## For Eŭropecon!

En la lasta numero, la prezidanto de TEJO skribis, ke la maleŭropigo de la Esperanto-Movado estas nuntempe ĉefa afero. Simile samideanoj ekster Eŭropo sin esprimas. En la lasta numero de *TEJO-Tutmonde* ni legas de Esperantisto el Japanio: "Mi envas la eŭropajn esperantistojn, ke ili bone interkompreniĝas, malgraŭ la fakto ke ili ne komprenas la verajn idealojn zamenhofajn kiel la homaranismon aŭ esperantismon, kiuj ĝenerale kongruas kun la japana pensmaniero. Sen tio la aziaj esperantistoj apenaŭ ekzistus. Multaj japanoj deziras almenaŭ unufoje partopreni IJK-on, ĉar en la gazetoj ili legas pri ties boneco. Sed la eŭropeco de la IJK-oj apenaŭ realigas tiujn revojn."



## Konkursol

Sur la dua paĝo de ĉi tiu numero vi trovos ekzemplerojn de la limerika arto en Esperanto. Provu verki la proprajn kaj sendu al la konstanta adreso de JEN/ELNA. Ni elektos la, laŭ ni, plej bonan kaj donacos al la bonŝanca verkist(in)o unu ekzempleron de la Esperanta Antologio. Do, akriĝu nun la kraĵonon kaj la humuron, kaj sendu viajn kontribuaĵojn al ni. La premiita limeriko aperos en la venonta numero de la JEN-bulteno.



## *Sur la nokta vojeto*

Malfrua nokto somera.

Malrapidaj paŝoj portadis min sur la vojeto antaŭurba, kie stagnis nur humida varmo kaj mallumo. La laboro en mia kompanio postulis de mi pli da tempo, ol mi antaŭkalkulis, kaj mi apenaŭ sukcesis trafi la lastan trajnon. Mi lasas ĝin ĉe unu el la stacioj proksimaj al la fina, kaj atingas hejmen post iom da piediro sur la vojeto inter kampoj.

La ĉirpado de insektoj leviĝas tie, ĉi tie, kaj haltas de temp' al tempo. La aero ne moviĝas, humida ŝvito atakas min senĉese. Intensa herbodoro ĉirkaŭe.

Ha, unu jaro jam pasis, de kiam li min forlasis?...

Li estis mia amiko, intima ekde nia lernejknabeco. Ĉu pro tio, ke li okupiĝis pri la studo de atoma energio, aŭ pro lia denaska konstitucio, ia malordo lin okupis ĉe la leŭkocitoj aŭ io, mi ne scias kia.

Mi lin vizitis al la hospitalo. Sed antaŭ ol mi lin vidos, mi demandis la kuraciston pri la irado de lia malsano:

"Kiel statas lia malsano, doktoro?"

"Malespere. Kontraŭ lia malsano la nuna medicina scienco estas absolute senpova. Ni nur povas diri, ke li vivas dank' al la konstanta sangotrans-fuzo."

"Kiom plu li povos vivi?"

"La kreskanta varmo estas fatala bato kontraŭ lia korpo. Sed neniam diru al li tion, mi vin avertas. Kuraĝigi lin ekzemple per gaja babilo estus probable la sola rimedo trovebla viaflanke."

Mi kapjesis, kaj enirinte lian ĉambron, mi lin gaje alparolis:

"Saluton! Mi supozis, ke vi nun preparas por la eliro el la hospitalo."

Sed li respondis en febla voĉo:

"Tute ne! Mi mem vidas, ke la Morto etendas sian longan manon ĝis la korto de mia domo."

Efektive li estis febliĝinta. Sed kun plena ignoro, mi prenis al li la manon kaj diris:

"Nu, mi estas lastatempe fervora studento de kiromancio. Lasu al mi vian manon. Jen rigardu: Ĉi tie aperas la signo, ke nenio absolute atakos vin dum la kuranta jaro!"

Li ridetis iom, rigardante sian manplaton.

"Ĉu vere?"

Kaj mi lin kuraĝigis:

"Absolute jes! Estu do fortanimal!"

Sed li ne povis transpasi la klimakson de la somera varmo, kaj nelonge poste, elspiris sian lastan spiron.

Unu jaro jam pasis for de tiam. Mi daŭrigas mian piediron, rememorante lian vizaĝon. La ĉirpo de insektoj leviĝis kaj haltis.

Subite mi aŭdis iun krii post mia dorso:

"Vi mensogulo!"

Sendube lia voĉo. Mi aŭtomate min turnis. Sed regis nur humide varma, densa stagnanta mallumo tie, de kie ŝajnis veni la voĉo.

El: Mikronoveloj de Sin'Ni Hosi (1983)  
Tradukis Kikumobu Matuba

"Neniu organismo viva povas daŭri sana longe sub kondiĉoj de realeco absoluta. Eĉ alaŭdoj kaj akridoj, laŭ supozo, sonĝas. Hill House, ne-sana, staras sola, kontraŭ la montetoj, en si mallumon tenante. Jam okdek jarojn ĝi staras kaj eble staros ankoraŭ okdek jarojn. Interne, la muroj daŭras rektaj; brikoj kuŝas ordeme; plankoj firme sidas; la pordoj prudente pendas fermaj. Silento kovradas la lignon, la ŝtonon de Hill House; kaj kio ajn tie promenas, promenas sola."

El: *La Hantado de Hill House*  
(*The Haunting of Hill House*)  
far Shirley Jackson, usona verkisto.



## "MISS CORA PRATT" La Sinjorino Falsita

"Miss Cora Pratt", la Sinjorino Falsita, konsistas el falsa dentaro, malnova peruko, bidoj, broĉoj, velkintaj floroj kaj, eble plej grave, el la fantazioj kaj iom petola inklino de

Polly Bushong, kiu kreis "Cora" kaj per ŝi trompas (kaj espereble instruas) homojn jam multajn jarojn.

La mistifiko trovas sian fonton en la kutimo de la patro de Polly ŝoki homojn per la portado de terpom-tranĉaĵo krenela kvazaŭ dentaro.

Polly, estante bonkondukta, obeema filino, fidele daŭrigas la familian tradicion per sia maskerado kiel "Miss Cora Pratt". "Cora" iam aperis, laŭ invito de la gastigantino, ĉe eleganta novjorka festo koktela, kie ĉeestis pluraj magnatoj komercaj, eminentuloj teatraj kaj, sendube, eĉ emeritaj fervojistoj. Ŝi portis ĉifonitan uniformon, eksmodajn ŝuojn, kaj ŝokis la festantojn, kaŝe trinketante dum ŝi servis al la gastoj kaj farante multajn aliajn mispaŝojn en tute naiva kaj vere senkulpiga maniero.

La intenco estas ne nur *epater les bourgeois* (ŝoki la burĝaron), sed ankaŭ instrui kaj vekti homojn al la antaŭjuĝoj kaj rigidaj vidpunktoj, kiuj emas dividi nin unu de alia, tiel subtenantaj kaj plialtigantaj la murojn, kluj, laŭ Zamenhof, staras inter la popoloj. Polly Bushong, kiel Zamenhof, celas faliĝi la murojn.

Pri "Cora" Polly diras: "Ŝi estas tiel *kara* kaj *kontenta* kaj *kortuŝa*; vin surprizus kiel multe oni povas diveni pri individuo per ties reago al Cora — ĉu tiu simpatias al ŝi aŭ ne".

La rilato inter la "vera" Polly kaj la "falsita" Cora estas kompleksa. "Cora" priparolas Polly kun altestimo kaj Polly jam sin dediĉis al "Cora"; dume, la patrino de Polly ne povas toleri "Cora" kaj la frato de Polly konsideras "Cora" rava.



Polly Bushong

Cora ektordas la lipharojn de diplomatoj maltrankvilaj; mencias nemenciindaĵojn en la akceptejo de "Chase National Bank"; kaj trinketas kafon el la subtaŝo ĉe restoracioj enmodaj. Ŝi gaje konversacias antaŭ la publiko pri receptoj, papilioj, kaj kondomoj. Iam ŝi vojaĝis al Bostono, portante skorpion kaŭĉukan sur la brusto.



"Miss Cora Pratt"

Polly diras, ke "Cora" loĝas en Peabody, Masaŝuseco, kie ŝi ĉasas papiliojn kaj bakas mielkukojn en dometo kiu superrigardas al publika necesejo. De tempo al tempo "Cora" ricevas pli da invitoj al festoj ol Polly, kaj Polly ĉagreniĝas kaj ŝajniĝas, ke la maskovestaĵo perdiĝis. "Cora", tamen, estas Polly kaj Polly estas "Cora". Ambaŭ estas maskoj. Kune, kaj nur kune, ili rivelas veran personon kaj veran veron.

*Tiom da kappoj, tiom da opinioj* Ja, jen la onidiro. Sed Polly ne kontentiĝas per ŝablono. Estas vero, kaj "Miss Cora Pratt" tion provizas al ni, almenaŭ provizore.

### — Fotoj far Diane Arbus —

Noto: Diane Arbus estis elstara, originala fotisto usona, kies specialaĵo estis la bizara, la ŝoka. Ŝiaj fotoj ofte aperis en la plej influaj gazetoj usonaj dum la 60-aj jaroj, ekz., **Harper's Bazaar** kaj **Esquire**. Ŝi sin mortigis en 1971. Ĉi tiu artikolo libere resumas ĉapitron en la libro **Diane Arbus: Magazine Work**, eldonita de **Aperture** en 1984.

Unu kritikisto skribis, ke: "Finfine, la granda humaneco de la arto de Diane Arbus estas la sanktigado de tiu privateco kiun ŝi unuavide ŝajne atencis."

Al tiu grandanima humaneco kaj kompatemo ni ĉiuj strebu per ĉiuj fortoj.

Diane Arbus mortis je la aĝo de 48.

## Letero de la Redaktoro

Jen la tria numero de la nova JEN-Bulteno, kiu ankoraŭ restas sen nomo. La reago de JEN-anoj al la nova bulteno estas, bedaŭrinde, ne granda. Se vi volas, ke ĉi tiu bulteno pludaŭru, tuj sendu viajn kontribuojn al la konstanta adreso de JEN/ELNA, trovebla sur ĉi tiu paĝo. Sen via helpo, ĉi tiu periodaĵo ne plu aperos kaj la restarigo de JEN kiel aktiva kaj stimula organizo fiaskos.

ELNA, kiel la centra Esperanto-Organizo en Usono, bezonas junajn homojn, kiuj pretas daŭrigi la laboron de la Movado en Usono. Estu tia kaj grave kontribuu al la estonteco de Esperanto kaj ties idealoj. Eĉ se via lingvonivelo ne ŝajnas sufiĉe granda, partoprenu en la vivo de JEN! Ni tradukos viajn artikolojn aŭ ĝustigos vian stilon. Sendu artikolojn, desegnaĵojn, kion ajn pri ĉia temo al JEN/ELNA. La nuntempa redaktoro daŭros plenumi sian postenon kiel redaktoro nur por la venontaj 2-3 numeroj. Se vi ne helpas konstrui kaj plifirmigi la bazon por nova junulara organizo esperantista en Usono, la JEN-Bulteno ĉesos aperi! Do, ek al!

### Konstanta Adreso

JEN/ELNA  
P.O. Box 1129  
EL Cerrito, CA 94530

ELNA Komisiito pri  
Junularaj Aferoj:  
James F. Cool  
137 N. Mulberry Street  
Wilmington, OH 45177

## Kalendaro

1985 oktobro 25-27:

La 3-a Senkrokodiliga Semajnofino de Nord Kalifornio ĉe belega Yosemite Institute (apud San Francisco). Kosto: \$55. Stipendioj por meritoplenaj gejunuloj haveblas. Dum la semajnofino okazos intensiva, rekt-metoda kurso por komencantoj. Por plia informo, kontaktu: Lusi Harmon, 1016 King Drive, El Cerrito CA, 94530. Telefono: (415) 524-8261.

1985 oktobro 11-13:

Intermountain Esperanto Conference, Salt Lake City UT. Kontaktu: Charles Hall, 7612 S. 2700 E., Salt Lake City UT, 84121.

1986 junio 30 - julio 18:

San Francisco State University 17a Esperanto-Kursoj. Kontaktu: Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough CA, 94010. Telefono: (415) 342-1796.

1986 julio 18-22:

34-a ELNA-Kongreso, SFSU, San Francisco CA. Kontaktu ELNA por detaloj.

1986 julio 26 - aŭgusto 2:

71-a Universala Kongreso de Esperanto, Beijing, PR Ĉinio.

## JEN BULTENO

aŭgusto-oktobro 1985

Vol. 1, numero 3

Redaktis & kompostis: Gregory Wasson  
Eldonis: Junularo Esperantista de Nord-Ameriko

Ĉiujn manuskriptojn, desegnaĵojn, ktp., bv. sendi al la konstanta adreso de JEN/ELNA. La redaktoro rezervas la rajton lingve kontroli aŭ rifuzi ĉiujn sendaĵojn.